

### ĜENERALA KUNVENO DE MEL

La lundon 28an de januaro okazis la jara Ĝenerala Kunveno de MEL, post kunvoko de la prezidanto kaj havigo de la necesaj dokumentoj. Ĉeestis 11 anoj, kaj estis reprezentita 1 plia.

La sekretario informis pri la evoluo de la anaro, kiu post la aliĝo de pliaj novaj membroj komence de la jaro, atingis la nombron de 45. Oni aprobis la ekonomian raporton de la pasinta jaro, kiu estis preskaŭ bilanca post la subvencio aprobata fare de la urbestro, sed ankoraŭ ne enkasigita. Oni aprobis la buĝeton de la jaro 2013.

La kotizo denove restos sensanĝa: 12 eŭroj jare.

Estis aprobata la raporto de aktivaĵoj de la jaro 2012 sendita de la sekretario. Oni aprobis la programon de aktivaĵoj proponitan de la estraro por la jaro 2013, kun kelkaj sugestoj.

Inter la kromaj komentoj, oni povas menciigi ke estis pritraktata la ebleco malfermi konton en etika banko, anstataŭ la nuna; oni esploras la avantaĝojn, sed oni lasos la decidon por venonta Ĝenerala Kunveno, konsiderante krome ke la panoramo pri etikaj bankoj probable ŝanĝiĝos en Hispanio dum venontaj monatoj.

Oni memorigis ke venontjare oni devos renovigi la estraron, kaj ke oni devas pripensi pri eblaj novaj kandidatoj.

Fine, oni diskutis pri la rezulto de la pasinta konferenco dum la Zamenhof-Tago. Estis konstatite ke la ĉeesto de neesperantistoj estis pli malgranda ol tio kion oni povus esperi, konsiderante la penojn por diskonigado. Inter la proponoj por plibonigo, menciindas: direkti la propagandon al specifaj sektoroj (movado 15-M, literaturaj rondoj, ktp) aŭ eĉ al konkretaj individuoj, kaj ne tiom al ĝenerala publiko; taskigi la kampanjojn al merkatikaj profesiuloj, ktp.

La protokolo estas baldaŭ sendota al ĉiuj anoj.

Memoru ke se vi ankoraŭ ne membras en Madrida Esperanto-Liceo, aŭ se vi deziras realiĝi, vi povas skribi al [madrid@esperanto.es](mailto:madrid@esperanto.es) aŭ ĉeesti niajn ĉiusemajnajn kunvenojn.

### PROGRAMO DE LA IBERIA RENKONTIĜO

Estis ĵus publikigita la programo de la Iberia Renkontiĝo, la ĉiujara renkonto de junuloj de la iberia duoninsulo, kiu ĉijare okazos en Madrid, en la junulargastejo San Fermín, inter la 15a kaj 17a de marto.

En aparta bildo oni povas konsulti la programon. La ĉefa celo de ĉi tiu renkontiĝo estas amuziĝi kaj koni interesajn homojn, ĉio per esperanto, kaj do la simplaj babiladoj okupos grandan parton de la tempo.

Vizito al la urbo estos ĉi foje iom speciala. Sabate nokte oni organizos gviditan viziton en Esperanto sekvantan la paŝojn de la literatura rolulo Max Estrella de "Luces de Bohemia" (*Lumoj de Bohemio*) de Valle-Inclán.

	Vendredo		Sabato		Dimanĉo	
	Esperanta	Disvastiga	Esperanta	Disvastiga	Esperanta	Disvastiga
10:00 - 11:00						
11:00 - 12:00			Libroservo	Kiel fari sian propran sapon	Kurso por komencantoj	Biciklado kaj manĝado
12:00 - 13:00				Projekto San Fermín		
13:00 - 14:00						
14:00 - 15:00						
15:00 - 16:00						
16:00 - 17:00	Akceptado			Peĉakuĉo		
17:00 - 18:00				Dokumenta Filmo The universal language		
18:00 - 19:00				SAT kaj esperanto		
19:00 - 20:00			Prelego: Esperanto y cultura			
20:00 - 21:00						
21:00 - 22:00		Interkona vespero		Gvidita vizito «Max Estrella tra Madrido: "Bohemia Nokto"»		
22:00 - 23:00						
23:00 - 00:00				Nokta diboĉado en Madrido		

Dimanĉe matene, se vetero tion ebligas, okazos biciklo-promeno tra *Madrid Río*, tiu nova parko en Madrido, lokita tre proksima al la gastejo San Fermín, kiu rekuperis la flankojn de la rivero Manzanares kaj provizis ĝin per vegetaĵaro kaj iĝis tre agrabla promenejo por la madridanoj. Oni poste kune manĝos piknike.

Oni ankaŭ pretigos programerojn por la ekstera publiko, inter kiuj prelego pri Esperanto kaj fulma kurso.

La baza kotizo estas 20 eŭroj. Ankaŭ eblas loĝado en la gastejo, sed tion oni devas anonci kiom eble plej frue, por informi la gastejon. Tiam la kosto estas 60 eŭroj. Oni devas ĝiri la monon al bankokonto 2103 0471 91 0030005725.



## IBERIA RENKONTIĜO 2013

15an/16an/17an de marzo

Albergue San Fermín  
Madrid

Ĉiuj necesaj informoj pri la renkonto aperas jam en la retejo <http://esperanto.es:8080/IberiaRenkontiĝo/>. Eblas kontakti kun la organizantoj ĉe la adreso: [IRoMadrido2013@gmail.com](mailto:IRoMadrido2013@gmail.com)

### PROGRAMO DE LA HISPANA KONGRESO

Ankaŭ la organizantoj de la Hispana Kongreso en Zaragozo (kiu okazos la uuan semajnfino de majo) diskonigis la provizoran programon, kiun eblas legi en la retpaĝo de la grupo "Frateco": <https://sites.google.com/site/zaragozafrateco/2013-hek/provizora-progra>

Menciindas la omaĝo kiun oni dediĉos al Fernando de Diego, tradukinto de la verko Donkiĥoto kaj de multaj aliaj literaturaĵoj al Esperanto, multajn jarojn loĝinta en la kongresurbo. Liaj disĉiploj, la anoj de la Ibera Skolo de literaturo, ankaŭ ĉefrolas dum la kultura parto de la programo. Ni ankaŭ povas konfirmi koncerton de la tuluza kantisto JoMo. Kaj fine sed ne laste, la kongresanoj havos la okazon konatiĝi kun ĉefaj vidindaĵoj de la aragona ĉefurbo.

Ni informos pli detale en venontaj numeroj. Dume, pliaj detaloj estas legeblaj ankaŭ en la retejo de Hispana Esperanto-Federacio: <http://www.esperanto.es/hef/index.php/kongreso>

### VIZITIS NIN

La lundon 28-an vizitis nin nia samideano el Leono, Miguel Ángel Bueno, kaj pola esperantistino el Bjalistoko, Marta Busko.

### HELPO AL ORFEJO DE KONGO

Memoru ke nia samideano Pedro Hernández peras helpkontribuojn por orfejo en urbo Goma, Kongolando, estrata de esperantistoj. Kontribuu al la konto ĉe Triodos Bank: 1491 0001 22 2042949723.

### VENONTAJ RENKONTOJ

La oficialaj kunvenoj de MEL plu okazas ĉiulunde je 18.30, en la sidejo de la strato Rodríguez San Pedro, 13, 3<sup>o</sup>.

La ĉimonata sabata babilrondo okazos la 2-an de februaro, kiel kutime en la VIP'S de la "Kuboplaco", je la 17.30.

Novaĵoj kaj detaloj aperas en retlisto [http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto\\_madrیده/](http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madrیده/), en retejo <http://www.esperanto.es/mel> aŭ en forumo <http://esperanto.creatufo.com/>

## madrida esperanto-liceo

San Alejandro 6-4<sup>o</sup>B-ext. 28005 Madrid (nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 horo en Rodríguez San Pedro 13-3<sup>o</sup>-7, Madrid

<http://www.esperanto.es/mel/>

[madrid@esperanto.es](mailto:madrid@esperanto.es)

Redaktas Toño del Barrio

Komentojn kaj informojn sendu al [niavocho@gmail.com](mailto:niavocho@gmail.com)

